4-a JARO, N-o 48 APERAS MONATE Decembro 1936

# SUR POSTENO

OFICIALA ORGANO DE INTERNACIO DE PROLETA ESPERANTISTARO

IPE-Oficejo, REDAKTEJO-ADMINISTREJO : Bourse du Travail, 14, rue Pavée, NIMES (Gard), Francio.
IPE-Centro : K-do H. HOMO, Postbox 305, LENINGRAD (U S S R).
Internacia PEK-Centro : K-do B. TURNER, Dundeestr. 60, EDINBURGH (Britio).

READMONO

## TASKO KONSTANTE AKTUALA

### PLIBONIGU LA PEK-LABORON !

La artikoloj en No. 45-46 pri P E K-laboro venis ĝustatempe. Kvankam en tro multaj I P E-grupoj ankoraŭ ne estas faritaj eĉ la unuaj paŝoj al serioza, planita P E K-laboro, ni tamen povas konstati multe pli grandan intereson pri P E K inter la I P E-anaro ol iam ajn antaŭe. En la plejmultaj kazoj ĉi tiu intereso jam transiĝis al aktiva partoprenado en tiu baza laboro, sed ni devas konstati kun bedaŭro, ke la elspezata energio k iniciatemo estas en multaj lokoj ne tre prudente direktataj, k rezultigas iom malesperigajn humorojn.

Ni certe ne intencas enviciĝi kun la teoriuloj k okupi grandan spacon en diskuto pri la relativaj meritoj de presserva k kolektiva korespondada laboroj, ĉar ni jam spertis, ke la plej efika rimedo por eviti k evitigi plenumon de malfacila tasko estas surreligi profesoran diskuton pri ĝi. Eĉ la plej fervora laboremulo tiam sentas inklinon formeti la ilaron k senfare rigardi la batalon inter la ekspertoj. Konstatu bone, gekamaradoj, ke ni jam de longe estas trapasintaj tiun stadion k estas atingintaj plenan konkordon. Ni faris decidojn, k la urĝa nuna bezono estas efektivigi la jam faritajn decidojn. Tre klare k detale la I P E-anaro formulis tiujn decidojn en la « Lille-a Rezolucio pri P E K-laboro » (Aŭgusto, 1934). La sekvintan jaron en Antverpeno la 2a I P E-kongreso unuanime aprobis tiujn direktivojn, k ilia korekteco pruviĝas ĉiutage en ĉiuj lokoj kie oni aplikas ilin.

Relegu, kamaradoj, k bone encerbigu la jenan elĉerpon el la « Rezolucio pri Serva Laboro » : « La kongreso emfazas, ke la organizado de internacia laborista korespondado inter lab. kolektivoj en laborejoj k organizoj restas la ĉefa serva laboro de ĉiu I P E-grupo ». Ni jam ofte montris per faktoj, ke la plej bona presserva laboro fontas el kolektiva korespondado, k ni ĉi sube citos freŝdatan fakton por tion substreki. En Edinburgo, kie la objektivaj kondiĉoj certe ne estas pli favoraj al ni ol en multaj aliaj lokoj, la grupo ricevis alvokon de niaj aktivuloj en Hispanio. Ĝi tuj trudis la aferon al la loka Sindikat- k Labor-konsilantaro, la plej grava laborista instanco en la distrikto kiu volonte sendis instigan salutleteron al la hispanaj laboristoj. La plena teksto de la letero aperis en la lokaj ĵurnaloj kies legantaro nombras proksimume 200.000. Almenaŭ 6 gazetoj en Hispanio publikigis ĝin. La respondo el Hispanio sekvigis similan, eĉ pli grandan publikecon. Notu bone, ke la tempo, energio k mono elspezitaj en tiu unu korespondo estis relative sensignifaj kompare kun la rezultoj.

*
**

Neniu komprenu per tio, ke ni volas malgravigi la rolon de P E K-bultenoj. La bultenoj plenumas k plenumos gravan k kreskantan rolon en nia P E K-laboro, sed ni ja volas emfazi : unue) ke se la fortoj disponeblaj k la objektivaj kondiĉoj permesas eldonadon de P E K-bulteno k ankaŭ organizadon de kolektiva korespondado, plenumu ambaŭ taskojn en reciproke intima interrilato ; due) se la objektivaj kondiĉoj estas favoraj k la disponeblaj fortoj permesas plenumon de nur unu el tiuj taskoj, nepre elektu la kolektivan korespondadon ; trie) kie la objektivaj kondiĉoj tute malpermesas organizadon de kolektiva korespondado, tie oni laŭeble eldonu P E K-bultenon ; kvare) kie ekzistas la ebloj plenumi ambaŭ taskojn k oni elektas sole la eldonadon de P E K-bulteno, tie oni ne nur agas tre malsaĝe, sed kontraŭas la demokratece esprimitajn decidojn de la organizo.

*
**

Ni legu nun alian elĉerpon el nia gvidrezolucio. « La kongreso postulas de ĉiuj I P E-sekcioj k U K-oj organizi senprokraste landajn P E K-centrojn por gvido k organizado de la P E K-laboro, kie ili ne jam ekzistas ». En ĝuste kia maniero kelkaj el niaj sekcioj interpretas tiun direktivon ? Ĉu ili diras al ŝi « P E K estas la baza ŝtono de I P E k sekve ni devas elekti la plej kompetentajn k-dojn por organizi landan P E K-centron k certigi al ili nian plenan moralan k materian subtenon ? ». Ili ne tion faras. Ili ĵetas la tutan pezan respondecon sur la ŝultrojn de kiu ajn laboremulo k lasas al li (aŭ ŝi) fari « preĝejon aŭ muelejon » el la afero — kutime oni faras eldonejon. Kulpas pri tio la sekciaj estraroj, ĉar kelkaj el ili aŭ tute forgesas, aŭ trovas pli oportune ne memori, ke P E K estas la praktika esprimo de ĉio kio pravigas ilian ekziston.

El pli ol unu loko ni ricevis « klarigojn » pri la neglekto plenumi la direktivon pri organizado de landaj P E K-centroj. Iu skribas, ke la premaj postuloj de ne-esperantaj taskoj forŝtelas multege da tempo k ke tuj post la situacio iom stabiliĝos, estos tiam pli facile ordigi la laboron. Komprenebla ! Se P E K estus pure inter-esperantista laboro, la rezonado de la k-do havus validon. Sed formulante ĝin tiel, la k-do montras helklare, ke li tute ne ekkomprenas la esencon de P E K-laboro. Ni allasu — k neniu kontraŭos — ke internacia laborista korespondado havas definitivan valoron k ni povas konkludi, ke la ĝenerala movado en kiu ajn lando ne mortos — male, multon gajnos — se plenmano da kamaradoj specialas en la internacia interliga laboro kiu estas P E K. Kelkfoje ni miras pri tio, ke tiom da I P E-anoj konsideras sin tiel nepre necesegaj en aliaj sektoroj de la batalfronto.

Por kontentigi la urĝajn postulojn de I P E-centro ni klopodas kompili statistikon pri P E K-laboro en la diversaj sekcioj. Kun peno k ĝeno ni iom post iom kolektas la informojn sed por tion fari ni devis turni nin senpere al la grupoj — jes, efektive en landoj kie ekzistas « P E K-centro », ĉar tiuj « centroj » tute ne koncernas sin kun la faroj aŭ nefaroj de la sialandaj grupoj. Ĉu ni estas tro postulemaj en tiu afero de raportado ? Kion ĝuste ni volas ? Ni volas informiĝi pri tio, kiom da ne-esperantistaj kolektivoj korespondadas kun eksterlandoj. Ni volas ricevi ne nur indikojn pri la ĝenerala kvanto da korespondoj, sed ankaŭ precizajn detalojn pri la organizoj, kolektivoj ktp. kiuj korespondadas. Ni volas informiĝi pri kiu ajn trafa uzo de P E K-materialo por veki amasintereson. Ni volas ricevi statistikon pri gazetoj en kiuj aperis nia materialo. K tio ne estas farebla, krom se la landa P E K-centro estas en intima kontakto kun ĉiu grupo en la koncerna lando. Necesas, ke iu k-do kolektu k konservu gazet-ekzemplerojn aŭ almenaŭ prestranĉojn de ĉiu gazeto aperiginta P E K-materialon en sia lando. Jen la plej gravaj faktoj raportendaj. La landaj P E K-centroj organizu la laboron tiel, k stimulu la grupojn al laboro, ke la raportoj el la landaj P E K-centroj estu plenplenaj je informoj pri plenumitaj k plenumataj laboroj. Surbaze de tio, ni povos plenumi nian devon kunordigante viajn laborojn.

Bert Turner, I. P. C.

## PORTUGALIO

NOTU BONE !

Je la fino de septembro 1936 la *Informa Polico* de l' faŝista diktatoro Salazar alsaltis ĉiujn sidejojn de la esp-societoj k sekcioj (ĉu proletaj, ĉu burĝaj). De tiam ĉiuj portugalaj esp-istaj ejoj estas sigelfermitaj k garditaj de l' polico.

Nuntempe estas malpermesata la lernado de esp-o en Portugalio.

La kialo de tiuj ĉi registaraj ordonoj kontraŭesp-aj estas la jena : la faŝisma diktatoraro portugala sciis, ke preskaŭ ĉiuj proletesp-istoj estas komunistoj.

*Atentu, gek-doj !* Bonvolu ne glui aŭ skribi kion ajn esp-an sur la kovertoj k banderoloj de pakaĵoj por Portugalio.

IPE-ano X.

## LA 3-A IPE-KONGRESO

En Aŭgusto 1937 okazos la 3-a I P E-Kongreso en Parizo. Ĝi estos okazaĵo tre grava ne nur por la eŭropaj I P E-anoj, sed ankaŭ por la transmaraj. Ja ĵus ni ricevis la informon, ke Aŭstralia L E A volas reprezentiĝi ĉe la kongreso per iu delegita k-do. I P E-anoj k simpatiantaj k-doj, venu are al Parizo ! Atentu bone la komunikojn en la venonta n-o de *S P* !

## ATENTU !

NIA POŜTĈEKA KONTO

De nun ĉiujn monsendojn por *S P*, EKRELO ktp nur direktu al la adreso de nia poŝtĉeka konto :

Métayer Auguste ; C. c. p. 127.08 Montpellier (Francio).

# DU DIMANĈOJ

## ĈU ESTAS PERMESATE ŜTELI ? ?

Certe, se oni anoncas « honeste », ĉu ne ? Do ni konfesas, ke ni faris « prenon » en la Britian P E K-bultenon de oktobro 1936.

Kion ni kaptis, sube ni prezentas al vi. Estas du artikoloj, unu de k-do Greenbaum k alia de k-dino Annie « la nigra ». Kio nin pleje impresis, la entuziasmo, la sindono, la literatura talento, kiuj nin alblovas el ambaŭ verkaĵoj : ni mem ne bone scias. Ĝuu ni almenaŭ kune, kion rakontas al ni niaj du, relative junaj I P E-geanoj Londonaj.

## FORTEGA TRIUMFO

Ĉiam mi memoras tiun tagon, la tagon kiam la unueco k forteco de la gelaboristoj de Orienta Londono triumfis super la minacanta besto de Faŝismo, kiu deziris eniri tien k disrompi la pacan vivon de la diversaj gentoj ĉi tie loĝantaj.

Ĝis dimanĉmateno, la tago aranĝita de la faŝistoj por sia marŝo, la loĝantaro de Orienta Londono esperis ke la registaro malpermesos tiun marŝon, ĉar ili estis sendintaj al la Ŝtatsekretario por Internaj Aferoj petskribon, petantan la malpermeson. Subskribis tion pli ol 10.000 personoj. Sed ne, la marŝo ricevis aprobon de la registaro.

Sed la laboristoj tute ne konsentis pri tio, kaj ĉie oni povis vidi la militkrion skribitan sur la pavimo ĉe ĉiu stratangulo « Ili devos ne trapasi ». Ankaŭ estis alvokoj, ke la homoj amasiĝu ĉe Aldgate (Aldget) k Cable Strato (Kablo Strato), tra kiuj lokoj la faŝistoj volis marŝi.

Iom antaŭ la dua horo, nia horo por renkontiĝi ĉe Aldgate, mi marŝis laŭlonge de la strato nomata Nova Vojo. Mi ekvidis longan procesion el eksoldatoj, kiuj marŝis al Aldgate. Kiam tiuj atingis la stratangulon k volis dekstren turniĝi, grupo da policanoj venis renkonte al ili kriante, « Reiru... vi ne povas veni tra tiu strato, reiru tuj ». El la eksoldatoj kelkaj respondis « Ne, ĉe la alia fino de la strato oni diris, ke ni ne marŝu tien, sed nur ĉi tien. Nun vi revenigas nin. » La policanoj ne multe diskutis kun ili, sed antaŭpuŝis sin, kun minacaj vizaĝoj.

Meze tra la homamaso la policanoj formis sufiĉan spacon por la trafiko. « Ĉu estas ankaŭ vojo por la faŝistoj ? » Dum ni staris, buso (1) post buso plenaj je policanoj alvenis : vere ili atendis maltrankvilecon. La laboristoj salutis ĉiun buson per laŭtaj sibloj de malŝateco.

Alia filiano al mi alvenis. Ni interparolis. « Mi ĵus venis de Tower Hill (Tura Monteto) kie la nigraĉemizuloj kuniĝis », diris li, « k ŝajne Mosley (2) (Mozli) devis kolekti sian tutan forton hodiaŭ, ĉar mi vidis buson plenan je faŝistoj, kiuj de Tunbridge Wells (Tunbriĝ Uels) venis. » Tiu loko estas preskaŭ kvindek mejlojn de Londono.

Estis la tria k duono, la homoj atendantaj senpacienciĝis. Ĉiuj parolis inter si. Oni aŭdis « Mi vetas ke li ne venos tien ĉi hodiaŭ. » Alia voĉo : « Mi ĵus revenis de Cable Strato k tie ili certe ne povos marŝi, ĉar oni starigis barikadojn trans la straton. »

Venis la kvara k duono sed ne venis Mosley, k laŭte la krio ondadis « Li ne kuraĝas montri sin. » Nun la polico oficiale anoncis, ke la marŝo ne okazos.

Je la lasta minuto li estis nuliginta sian triumfan (?) marŝon tra Orienta Londono. Ĉiuj vojoj estis baritaj kontraŭ li. Tion vidante la policestro konsilis al Mosley, ke li nuligu sian planon. Kia fortega triumfo por la laboristoj ! Ĝojo estis en la aero !

Annie Cohen, *Stepney P E K*.

(1) (aŭto-)buso.
(2) gvidanto de la anglaj faŝistoj.

## TAGO HISTORIA

Je Dimanĉo, Septembro 20an, la Londona Komunista Partio organizis plej unikan demonstracion. Diras la faŝistoj k kapitalistoj, ke la komunismo estas « fremda kaj alilanda » al la Britia popolo, sed per tiu demonstracio ni montris, ke tiaj argumentoj estas mensogaj. Ni montris ke komunismo vere el la Britia tero kreskis.

La demonstracio estis paradprezentado pri okcent jaroj da nia historio. La batalantoj por libereco dum la « mallumaj jaroj » de la mezepokoj, la poetoj de la popolo, la soldatoj de progreso, ĉiuj refoje marŝis kun ni en nia batalado.

Je la 2,30 horo p. t. m. ni estis pretaj komenci la marŝon al la Parko Hyde, la plej granda k mondkonata parko en Londono. La scenejo de multaj antaŭaj manifestacioj, kelkaj sangaj, k la hejmo de « libera parolo ». Ni sur la Embankment (Rivermurstrato) kunvenis, apud la Parlamento. Je unu flanko fluis la Tamizo, amata rivero de Londonanoj, k je la alia estis rivero el ruĝaj flagoj flirtantaj en la vento, sub la varmaj lumaj radioj de la posttagmeza suno. Freŝa k sent-impona bildo.

La voĉoj de la marŝantoj, kantantaj la « Internacio-n » kiam ni komencis marŝi, tuŝis la koron. Kvinmil da voĉoj leviĝantaj en kantado.

La disciplino de la partoprenantoj estis treege bona, k oni plenumis la ordonon, ke neniu forlasu sian lokon dum la marŝado. Ĉiu filio estis aranĝata laŭ alfabeta ordo, k la tuto estis sekciigita en ses sekciojn. Ĉar la mia estas la filio Stepney, mi marŝis je preskaŭ la fino de la demonstracio. Antaŭ mi etendiĝis la linioj de ruĝaj k blankaj standardoj k flagoj, ĝis pli ol unu mejlo.

La standardoj de ĉiuj filioj estis novaj, speciale faritaj pro tiu ĉi okazo. Ruĝflam-koloraj, la nomoj de ĉiu filio en blankaj vortoj, la vortoj « Komunista Partio de Granda Britio » kun martelo k serpo je la centro, tre bele ili aspektis.

La unua historia standardo montris kiel la Reĝo Johano en jaro 1215 estis devigata subskribi la Magna-n Carta-n (Grandan Carton), laŭ kiu ĉiu persono en la lando, eĉ la reĝo mem estis sub regado de « komuna leĝo ».

Ĉiu venko de la popolo, ĉiu heroo, poeto, politikulo de 1215 ĝis hodiaŭ estis per propraj standardoj reprezentataj en tiu demonstracio.

Fine oni vidis la portretojn de Harry Pollitt (Hari Polit) k Vilhelmo Gallagher (Galager) nia komunista parlamentano, la amataj gvidantoj de la Britia Komunista Partio. Laste venis la standardo kun devizo « Por Libera k Feliĉa Anglio ». Jen la programo de la Kompartio en unu devizo. Oni aŭdis la harmonion de l' Internacio. Kia vidaĵo. Ke oni marŝis en tia pluvado estis vere brave. Ĉiu kamarado diris, ke pluvo ne gravas, se ni en Hispanio estus, ni oferus la vivon, ne nur la vestojn.

R. Greenbaum, *Stepney P E K*.

# SOVETIO

Ekstremoj de ĉiuj malavarecoj en unu sola ; sankta fervoro proletara ; potenco timinda k nekomparebla ; vibrado senĉesa de ĉiuj la nervoj antifaŝistaj ; forĝejo de Justeco, fandejo de Egaleco : SOVETIO ! Ni vin salutas, patrio de la tutmonda proletaro ! Pro via honesta agado ! Ni vin salutas kun koro tremanta ! Hispanio vin salutas, kabano kamparana, hejmo civitana de l' lando proleta, kiuj kunvivas niajn horojn dramecajn ! Ni vin salutas, Soveta Unio, kies bruston vi malfermas al la, de l' faŝistoj, sieĝataj landoj. Soveta Unio kies profunda doloro estas la doloro de Hispanio, kies larmoj estas la larmoj de la tutmonda laboristaro, kiu hodiaŭ tremas pro sankta kolero, pro sankta indigno, pro sankta malamo...

Sovetio, al vi kiu konis, kiel ni, ĉiujn frapojn, ĉiujn turmentojn de la caraj jaroj, al vi ni esperas, al vi ni rigardas, k al vi ni sendas avide k varme nian plej koran saluton ! !

El : *Popola Fronto,* Valencia (Hispanio).

## SP-FELIETONO

# LA « KOMPLOTULOJ »

Ĉisube niaj legantoj trovas rakonton, kiu aperis en la nederlanda. laborista ĵurnalo *De Tribune* (La Tribuno). La anonima, proletverkinto elektis kiel temon la P E K-laboron. Ni nur povas ĝoji, renkontante en nacia lingvo literaturan pritrakton pri tiu grava agado de laboristaj esp-istoj.

La verkinto uzis kelkajn koncernlingvajn frazojn (ankaŭ esp-ajn), kiujn ni presigis grandlitere.

Red. de *S P*.

Se oni iras laŭ la koridoro, preter la pordistejo oni vidas rekte antaŭ si la eniron al la privata kontoro de inĝeniero Harmo Kuraŝi. Plejofte la pordo estas nefermita. Tiam Kuraŝi povas rigardi de post sia pupitro, tra la koridoro la Kaŝingistraton.

Estas trankvila strato, sur kiu iras neniu, kiu ne havas ion por fari en la kontoroj aŭ maŝinhaloj de la lumcentrejo.

Se tro laca estas lia cerbo por labori, Kuraŝi rigardis al la strato, provante diveni, kion devas fari la homoj, pro kio ili venas. Kelkaj iras rekte al la maŝinhaloj, aliaj celas la ekspoziciejon, la kasgiĉeton aŭ la oficejon de la ĉefkontrolisto. Tiu aŭ alia pase parolas kun la pordisto. Tiam alvenas la pordisto por demandi, ĉu s-ro Kuraŝi havas tempon por interparolo.

Kuraŝi preskaŭ neniam divenas la dezirojn de la homoj. Tio ankaŭ ne ĝenas lin. Li nur divenas por ordigi siajn pensojn se ili ne emas limiĝi al la maŝinoj, al la planoj k ciferoj sur la papero antaŭ li. Ja estas tro multe da aferoj, kiuj maltrankviligas lin.

Foje venas eŭropano. « Li iros al la ekspoziciejo » pensas Kuraŝi. Sed ne. Tion li efektive devus vidi. Ĉu eŭropano kun negladita pantalono k iom griziĝinta ĉemizo iras al la ekspoziciejo ?

La eŭropano ion demandas ĉe la pordisto. Kaj tiu ĉi lasta tuj observas ion fremdan je tiu eŭropano. « Ĉu s-ro Kuraŝi emas paroli kun tiu ĉi ulo ? » « Jes, li venu do ! »

Enirinte la privatkontoron la eŭropano demandas : « Kuraŝi ? » Kuraŝi kapklinas : « Jes. » « Bonan Tagon, Kamarado » la eŭropano diras, « Vi Ja Estas Esperantisto, Ĉu Ne ? » « Jes, Jes » k Kuraŝi subite vigliĝas. Li leviĝas el sia brakseĝo k premas la manon de la eŭropano.

« Kamarado... » li sin prezentas. La eŭropano diras nomon, kiun Kuraŝi ne komprenas. Eŭropaj sonoj. « Kamarado » li nur ripetas. Jes, tiu vorto estas sufiĉa ! La blankulo rakontas. Kuraŝi aŭskultas k kapjesas. Aŭskultante Kuraŝi pensas, ke li neniam vidis blankulon kun vere bela kapo. Sole tiu ĉi estas la unua — aŭ ĉu nur pro la grandaj, briletantaj okuloj ?

« Tion ĉi ili kundonis por vi. Ili ne plu riskis sendi ĝin poŝte. Ni supozis, ke tio danĝerumus vin ĉiujn. »

« Jes, jes » kapklinas Kuraŝi. « Tri mil el ni estas arestitaj. » Per manoj tremantaj Kuraŝi ŝirmalfermas la paketon, kiun la eŭropano donis al li. « El Tria Regno » li legas, « Proletoj El Ĉiuj Landoj Unuiĝu Vin. » Piede Kuraŝi puŝfermas la kontorpordon...

Ĉitage Kuraŝi kontinuas labori kun febra rapidemo. Ĉitage k ĉinokte. Li legas, tradukas, skribas. Monto da gazeteltranĉoj kuŝas antaŭ li. Li telefonas, oni telefonas al li. Homoj venas al lia kontoro, fermas la pordon post si k denove foriras baldaŭ. La pordisto pensas, ke Kuraŝi havas multon farendan kun tiuj homoj. Kaj kial estas tiom, kiuj tute ne demandas lin, la pordiston, sed simple pasas...

De Japanio la « Bortland » rekte veturas al Liverpul (Liverpool). Iu maristo tradukas en siaj liberaj horoj el la « P E K-Servo Japania » por la « P E K-Centro En Britio » en la anglan por « Contact With The Workers Of The World » (kontakto kun la laboristoj tutmondaj). Grupoj de la ruĝa helpo, anoj de la komunista junularo en Edinburgo k Londono hektografas, disvastigas.

Redakcioj de japaniaj gazetoj ricevis informojn el la tria regno. Redaktoroj legas, substrekas, pripensas, transdonas al la presejoj.

Kiomi, Joŝio, Tahu tradukas, hektografas. Folietoj en japana, ĉina, angla lingvoj disvastiĝas tra la lando, en fabrikoj grandaj k malgrandaj.

Kuraŝi legas la foliojn. Li aŭskultas, kion oni rakontas al li. Ĉu Tahu arestiĝis ? Bedaŭrinde jes. Ĉu la laboristoj de la uzino kontraŭis la arestigon ? Ĉu ili demonstraciis ? Brilege ! Kaj demonstracio en la haveno ? Bone, bone !

Kuraŝi estas laca, tre laca. Li frotas siajn manojn k liaj okuloj ridas. Ooguri, la hejtisto ankaŭ estis ĉe Kuraŝi. Kion li faras, tiu hejtisto, ĉe la ĉefinĝeniero Kuraŝi ? Suniko vidis, ke Ooguri ricevis pakon da paperaĵoj de Kuraŝi k ke li kaŝis ĝin sub siaj vestoj. Kaj Ooguri estis vidita, kiam li pendigis paperon sur muron de la maŝinhalo : « manojn for de Sovet-Unio ! » Nun ja, Ooguri povis silentadi, neante, ke li ricevis paperaĵojn de Kuraŝi. For ! For ambaŭ el la fabriko el la kontoro. En la malliberejon !

Akita ankoraŭ havas paperojn k Hamo k Higo. Sur la plantejoj, sur foiroj, en la teksejoj oni disvastigas ilin. Akita diras : « Ooguri k Kuraŝi estas en la malliberejo. Kaj Tahu ankaŭ. Ke oni ne kaptu ankaŭ nin ! »

De kie venas la pamfletoj ? Tri mil japanaj komunistoj en la malliberejo. La polico serĉas k blasfemas. Hama diris : « Ke oni ne kaptu ankaŭ nin ! »

Japaniaj laboristoj legas : P E K-servo. Raportoj el la tria regno. Japanaj laboristoj postulas : « Manojn for de Sovet-Unio. »

Trad. : N. C.

EKMARŜO UNUECFRONTA

# REVOKO AL PUBLIKA LETERO

En Ĉeĥoslovakio aperas tre bone redaktata monata organo: *Proleta Espisto*. Tiu ĉi gazeto en la n-o 9 (oktobro 1936) publikigis « Publikan leteron ». Per ĝi P E refutis kelkajn atakojn de la Laborista Ligo Esp-ista en Ĉekoslovakio, kiu asertis, ke la eldonantoj de P E anstataŭ unuigi, dividas k ke P E konkurencas al la Bulteno de L L E. Plue P E proponis kunfandon de P E kun la Bulteno, konigante siajn kondiĉojn.

Tiu ĉi simpatia agado de niaj ĉekoslovakiaj amikoj trovis resonon ankaŭ en la koroj de multaj aliaj ĉekoslovakaj k-doj. Krom aproboj de unuopuloj alvenis letero de la Laborista Esp-Asocio en Jablonec al P E, kiun ni plene represas.

Jablonec, 10. 10. 36.

Karaj gek-doj,

Bonvolu permesi, ke per hodiaŭa skribaĵo ni sciigas al vi jenon: la ĉeestintoj de nia grupa kunveno komisiis nin konigi al vi ilian deziron.

Konstatante la fakton, ke en nia respubliko inter la laboristaro la esp-movado malrapidege progresas, ke malgraŭ la malgranda nombro de laboristaj esp-istoj ni estas instigataj aboni al 3 diversaj enlandaj, laboristaj esp-gazetoj ni decidis proponi al nia Ligo (do al L L E, kies Bulteno kritikis al P E. Red *SP*), ke ĝi intertraktu kun la redaktanto de P E, kun la germana ligo en Aussig pri kunfandiĝo en unu centra ligo laborist-esp-a tutŝtata: aŭ almenaŭ intertrakti pri komuna eldono de nur unu gazeto. Kiel bazo servu la proponoj faritaj en oktobra n-o de P E.

Tiun celon oni penadu atingi pro morala kiel financa profito sub la devizo: tion kion sukcesis efektivigi la francaj, laboristaj esp-istoj ankaŭ kapablas la ĉekoslovakaj.

En nia movado ne temas pri bone pagataj oficistoj, kiuj ĉefe reprezentas siajn materiajn interesojn, fakto, kiu ofte en la ĝenerala movado malhelpas ĉian unueciĝon.

Sekvas diversaj proponoj, el kiuj ni citas nur tiun sub 6/:

Oni rapidigu la unuecigan laboron tiel, ke ekde 1937 ekzistu en Ĉ S R unu centra ligo laboristesp-ista kun unu gazeto. Al ekago sub la lozungo: Proletesp-istoj de unu lando unuiĝu!

*Protokolistino:* Ludmila ERBEN. *Prezidanto:* BERGMANN Jos.

*Laborista Esperanto-Asocio*, Jablonec/Neisse.

Ni tute kore aplaŭdas la iniciatemon de niaj k-doj en P E, Mor.-Ostrava. Antaŭen por la landa unuiĝo. Antaŭen por unuecfrontiĝo internaciskale!

Dum landa konferenco, kiu okazis en la pasinta monato, konsiderinte, ke tiu ĉi gravega tempo postulas ne frazojn, sed farojn, ni post serioza k profunda pritrakto decidis, ke *LIKVIDO de la Nederlanda Unuiga Komitato* plifaciligos la efektivigon de la unueco.

Konsekvence ni alvokas ĉiujn niajn anojn k simpatiantojn al ni, ĉiujn unuecemajn laboristajn esp-istojn, ke ili aniĝu al Federacio de laboristaj esp-istoj, k al tiuj, kiuj jam estas en ĝi, ke ili lojale kunlaboru kun la federacia anaro, kun la sincera volo: ke ĉiuj laboristaj esp-istoj ŝultro al ŝultro batalu por la komuna idealo, kontraŭ la komuna malamiko!

Restas al ni deklari, ke N U K ĉiam havis nur la celon propagandi la praktikan aplikon de Esp-o en la klasbatalo, kiel tio estas esprimita en la programo de I P E. *Neniam* estis nia celo fari skismon en la fed-io kaj ankaŭ ni neniam penis fondi propran organizon flanke de la fed-io. Nian anaron ni trovis inter la anoj de la fed-io kaj inter tiuj laboristaj esp-istoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne emis aniĝi al ĝi.

Certe estos inter ni, kiuj bedaŭros la malaperon de N U K, de ĝia organo *Ruĝa Batalanto*. Sed al tiuj ni diras: ne estas plej grava la propra rondo aŭ la propra organo. Grava por ĉiu laboristo estas nur la batalo kontraŭ la minacantaj danĝeroj de faŝismo k milito, ankaŭ por la esp-istaj laboristoj. Ĉiuj sur sia tereno havas la taskon kune formi la bazon por tiu batalo. Al la plenumo de tiu tasko ni vokas ĉiujn!

Estraro de la nederlanda Unuiga Komitato.
Redakcio de *Ruĝa Batalanto*.

## ESP-O EN LERNEJON

Ni ricevis jenan informon:

« La laika Asocio de Gepatroj de la lernantoj en la Lernejoj « Bischoffsheim » en *Nice* (Franc.), reprenante sian deziron, esprimitan en la ĝenerala kunveno de la 30a de Junio 1933, konfirmas sian volon por la enkonduko de Esperanto en la publikajn lernejojn.

« Ĝi sendas preman alvokon al la franca Ministro de l' Nacia Edukado kaj al la Deputitoj de la distrikto de « Alpes-Maritimes » por la triumfigo de la internacia lingvo, kies simpleco faciligos la turisman prosperon kaj la rilatojn inter la popoloj. » NOVEMBRO 1936.

## LA FRATA MANO

Plenum-Komitato de S A T sendis al redakcio de *Sur Posteno* « Manifeston » al la esp-istaj laboristoj. Tiu ĉi manifesto estas bazita sur la rezolucio de la lasta S A T-Kongreso en Manĉestro, kiu sugestas, ke ĉiuj laboristaj esp-istoj... aliĝu al S A T. Samsenca ankaŭ estas la « manifesto ». En akompana skribo oni petas publikigi la alvokon, « ĉar ĝi rilatas la unuecon de la laborista esp-istaro ».

Ni ne volas agi same kiel I S E, kiu responde al priunuecfronta letero respondis, « ke I S E ne havas kaŭzon interrilati tion ».

Ĉar efektive pri *aliĝo* al S A T ne utilas diskuti. Necesas unufoje por ĉiam noti, ke ne temas pri *aliĝo* de proletesp-istoj al I P E, S A T aŭ alia organizo. Temas sole k nure pri *unueciĝo* en unu solan kreotan mondorganizon, kiu konformas al la ideologiaj k organizaj aspiroj de la nuntempaj, proletaj esp-istoj.

Tial ni plenrajte povas klasifiki la « manifeston » de S A T nura *aliĝopeto*.

Fina frazo de la « manifesto » tekstas: « k-doj, via loko estas en la vicoj de S A T. — Ne rifuzu la manon fratece etenditan al vi en Manĉestro! »

Ĉu ni bone legis? En Manĉestro ja nur kun plej malagrablaj sentoj la samaj S A T-estroj, kiuj en Francio troviĝas en unu organizo kun I P E-anoj diskutis pri unueco k tute negative! (Legu la raporton en S P 47).

La unuecfronta demando ne solviĝas per propagando por S A T. Estus intence naive tion ŝajnigi. La « frateca mano » en Manĉestro nur etendis S A T-aliĝilon al la proletaj esp-istoj. Sed kion S A T *efektive* pretas fari por la unuigo de ĉiuj laboristaj esp-istoj el diversaj internaciaj k landaj ligoj en unu mondorganizon? A. R.

**K-do BOUBOU, Orléans**

informas, ke li pro malsano k pro malsano de la edzino ne povas respondi al siaj korespondantoj.

## NE FRAZOJ, SED AGOJ

En la nuna tempo ni ne bezonas ree akcenti, ke la reunuiĝo de la laborista Esp-istaro tutmonda estas por N U K plej atinginda celo, k ke ni estas pretaj fari ĉion por helpi al la efektivigo de tiu ĉi reunuiĝo.

Ĉiel subtenante la klopodojn de I P E por realigi la unuecon internaciskale, ni pensis plenumi la taskojn, kiujn la I P E-sekcioj kaj U K-oj tiurilate havas en propra lando. Pro la sinteno tamen de la federacia estraro, kiu konstante rifuzis interrilati kun ni, N U K ne sukcesis starigi kun la fed-io la kontakton, necesan por kunlaborado.

La afero de la unueco estas por ni ne simpla diskutproblemo, sed inter ni regas la decida volo atingi ĝin. Sekve de tio ni devas progresigi ĉion, kio helpas al ĝia efektivigo k forĵeti ĉion, kio baras al ĝi la vojon.

Jam dum kelka tempo la estraro de N U K kun la tuta anaro pridiskutis la demandon, ĉu la ekzisto de N U K estas tia baro. El la diskutoj montriĝis, ke multaj unuecemaj k-doj en k ekster la fed-io ne volas aniĝi al N U K, ĉar ili ne vidas en N U K rimedon por atingi unuecon, sed ili konsideras N U K kiel organizon, kiu kaŭzas certan disiĝon inter la laboristaj esp-istoj en nia lando. Tio certe devenas de la malĝusta informado fare de la fed-ia estraro, kiu cetere konscie donis al N U K la ŝildon de komunista organizo. Ĉar la apeldorna Rezolucio malpermesis al ni malkaŝe paroli pri tiuj temoj k defendi N U K, ni ne povis sufiĉe atingi tiujn k-dojn por konvinki ilin pri la neĝusto de tiaj diroj.

Tiamaniere ekzistas la danĝero, ke ni anstataŭ tiri tiujn k-dojn en niaj vicoj, restas izolitaj. K sektismo neniam povas esti nia celo.

## MALSATO EN SOVETIO

En Ĉekoslovakio aperas tre bone redaktata mosovetiano mem! Niaj sovetiaj amikoj k tute speciale niaj esp-amikoj malsatas al korespondado! Tag-tage enflugas en nian redakcian poŝtokeston la korespondpetoj de sovetiaj k-doj. Kaj ni nur malofte povas kontentigi ilin.

Ĉisube ni presigas helpokrion de sovetia k-do, ĉerpitan el *S L E A-Aktivisto* (organo de svedia Unuiga Komitato). Ĉiuj ekstersovetiaj k-doj bone registru en sian memoron, ke ili devas havi almenaŭ unu sovetian korespondanton. Helpu forigi malsaton al korespondado en Sovetio!

Legante la rubrikon min ĉiam okupadas la menso: ĉu svedaj laboristaj k proletecaj esperantistoj tute ne volas korespondi? Rigardu, k-doj, al la paĝoj de *S L E A-Aktivisto*! Sub la rubriko « Korespondado » estas trovataj nur adresoj de sovetiaj gek-doj. Ili montras bonan ekzemplon al vi, svedaj kamaradoj!! Mi mem estas sovetiano k kiam mi volis trovi la adresojn por miaj lernantoj, tiam mi ekvidis, ke en *S L E A-Aktivisto* estas kvazaŭ sovetia adresaro!! Komprenenble en la gazeto eldonata en k POR Svedio tio ĉi estas klarigebla. Sed *S L E A-Aktivisto* ja estas ne nur ENlanda bulteno, kiu celas nur disvastiĝon EN Svedio. La *S L E A-Aktivisto* ja estas ankaŭ P E K-bulteno POR eksterlando k tiam komprenenble, ni ekstersvedianoj volas scii la adresojn de la svedaj korespondantoj!! Estas tre bedaŭrinde, ke, laŭ mia opinio, la legantoj de tiuj ĉi gazetoj (mi celas *Sur Posteno*, *S L E A-Aktivisto* k aliajn P E K-bultenojn) tre nevigle respondas al la anoncoj de la rubriko « Korespondado ». Almenaŭ mi mem spertis tion. Al mia anonco en *Sur Posteno* respondis post 3/4 jaro nur unu finno. El la anonco en *Ruĝa Batalanto* (Nederlanda), al anonco en I P C-informilo nur 1, al anonco en kanaria esp-a flugfolio respondis eĉ NENIU! Mi verkis du artikolojn pri P E K k korespondo, tiujn oni presis en *Sur Posteno* (sovetia eldono) k la alian mian artikolon oni presis en S P I. En ambaŭ artikoloj estis menciita mia adreso k mi alvokis ĉiujn legantojn de la artikoloj skribi al mi sian opinion pri la enhavo de la artikoloj, sed al mi respondis nur... sovetianoj!! Ĉu la temo pri internacia korespondado estas indiferenta por vi, ekstersovetianoj?? Mi opinias, ke ne! Sed kial vi neniam respondas, kial en *S L E A-Aktivisto* preskaŭ ĉiam mankas la adresoj de svedoj??

Mi estus treege kontenta, se al mia letero sekvus la riverego da leteroj, kiuj pruvus al mi, ke mi eraris, eĉ eraregis... Mi volas, volegas erari, sed ĝis nun mi ne povas al mi klarigi, kial en SVEDA P E K-bulteno dediĉita por eksterlando estas nur sovetiaj adresoj (kio estas tre bona), sed samtempe preskaŭ tute mankas la adresoj de svedaj proletesperantistoj.

Mi skribas la artikolon speciale al vi, eksterlandaj esp-istoj. Kial vi estas malviglaj je korespondo? Kial mankas viaj adresoj en la rubrikoj « Korespondado »?

Mi firme esperas, ke tuj post kiam oni presis en *S L E A-Aktivisto* tiun ĉi artikolon, vi, karaj k-doj, pruvos al mi, ke mi eraris. Mi nur petas vin pruvi tion ĉi al mi ne per indignitaj leteroj, ne per diskutoj aŭ disputoj. Ne, mi petas vin pruvi tion ĉi per tio, ke en la sekvontaj *S L E A-Aktivisto* k *Sur Posteno Internacia* aperas multe da adresoj de eksterlandaj esperantistoj. Ne per vortoj mi petas vin pruvi vian pravon, sed per agoj! Ne forgesu, ke « P E K estas la ĉefa ŝtono de I P E-laboro »!

Se iu ekvolos persone skribi al mi, al tiu mi volonte respondos. Mia adreso: Inĝ. V. Gruŝko, Socialistiĉeskaja 169, kv. 4, *Rostov Don*, Sovet-Unio (U S S R).

VOGO.

## ★ masonu ★

la financan fundamenton de *Sur Posteno*, por ke ĝi povu vivi k paroli. Helpu, ke nia centra organo povu aperadi regule, sendeficite. Sendu financan subtenon laŭpove k laŭplaĉe. *SP* akceptas ĉion: monbiletojn (tamen validajn!), poŝtmandatojn, respondkuponojn, eĉ monigeblajn nutraĵpaketojn de sovetiaj k-doj! Metu vian brikon!

ESTU *SP*-MASONISTO!

*Listo I-a*

| | | |
|---|---|---|
| K-do Lorquet, Paris . . . . . . | fr. fr. | 150.00 |
| K-do M. Boubou, Orléans . . . . . | fr. fr. | 150.00 |
| K-do H. Madepaso, Nîmes . . . . . | fr. fr. | 10.00 |
| K-do M. Métayer, Nîmes . . . . . . | fr. fr. | 5.00 |
| K-do N. Ecert, Nîmes . . . . . . | fr. fr. | 5.00 |
| K-dino S. Kandel, Amsterdam . . . . . | gld. | 0.20 |
| K-dino L. van Duin, Amsterdam . . . . | gld. | 0.20 |
| I P E-anoj el Londono k Edinburgo . . . | ŝil. | 10.00 |

DANKON AL ĈIUJ MASONISTOJ!!

# ZIGZAGE

*Revuo pri esp-gazetoj*

### ADIAŬ

*Herezulo,* la privata organo de Lanti k de la « Sennaciista frakcio en S A T » mortis. Kaŭzo citita en n-oj 7-8 (1936) : ĝi ne havis sufiĉe da abonantoj. Tiu ĉi hontema klarigo sendube nur celas kaŝi la fakton, ke neniu serioza proletesp-isto emas esti titolata abonanto de *H-ulo,* des malpli subtenanto de ties senmedola « batalo kontraŭ ĉiajn dogmojn ». Ja herezi ne identas kun mensogi kaj kalumnii.

Lastfoje ni amuziĝu pri jenaj asertoj : « ...en tiu organizo (I P E) la plimulto da anoj en realo ne estas esp-istoj. » Kaj ankoraŭ : « Eĉ la caro deziris, ke liaj regatoj estu feliĉaj. » Kaj fine : « ...la eksterlanda politiko de Stalin similas tiun de la caro. »

Vid-vide al tiaj spritaĵoj facilege estas memori, ke onklo Lanti nun estas 15 jarojn pli maljuna ol 1921 !

Tutkoran « adiaŭ » ! Lasu ni H-on ripozi pace.

* * *

### DANGERA PEK

En *Sennaciulo* de oktobro 1936 Glodo plendas, kvazaŭ P E K minacus la unuecon en la francia laborista esp-istaro. « Ne sufiĉas ĉiam paroli pri unueco : pli utilas agi unueceme. »

Laŭ li la ĉefa tasko de la unuiĝinta franca F E T estas propagandi esp-on. Bone, sed kial ne lasi al la propagandistoj sian laboron k krome la P E K-ojn instigi ankaŭ fari propagandon ? Ne suferos la unueco. Kontraŭe malaperos per tio la emo de iuj esp-istoj konstrui kontraŭecojn inter la proletaj esp-istoj tute ne ekzistantajn.

### « POPOLA FRONTO »

estas presita informbulteno internacia pri hispana lukto kontraŭ la faŝismo. Ĝi estas bonege aranĝita k eldonita de la grupo laborista esp-ista en Valencio.

Sur pĝ. 2 ni represas artikoleton el tiu ĉi multenhava k interesa organo.

* * *

### PRI HISPANIO

Regule atingas nin informbulteno de la esp-fako de C N T - F A I (anarkista), Barcelono k *Unueco,* informbulteno de la barcelona I P E-grupo. En n-o 47 ni publikigis artikolojn el ambaŭ organoj.

* * *

### STRANGA MIKSAJO

*Suda Kruceto* estas hektografita, teknike bonega organo el Aŭstralio. Ĝi uzas tamen lingvaĵon kiu supoziĝas, ke la eldonanto-redaktoro ankoraŭ devas lerni iomete. Ja estas nekredeble, ke esp-isto iom bone konanta la lingvon kapablas produkti tian lingvo-fuŝaĵon, kian ni trovas en *S. K.*

Tiu konstato ne nur rilatas la esp-lingvaĵon. Oni trovas tekstojn en occidental, ido, etem, okaze ankaŭ nacilingvajn liniojn (en n-o 12 fuŝan germanlingvaĵon). Ne tre konvinka maniero por « esp »-gazeto.

« Respondeci » fariĝas en *S. K.* « rispondi » (julia n-o), sed poste « risponsi » (aŭgusta n-o), tiam denove « rispondi » (septembra n-o) k fine ree « risponsi » (oktobra n-o) ! !

Malbone komprenebla kiel la lingvaĵo ankaŭ estas la vojo, per kiu *S. K.* volas agi por « amo, vero k paco ».

« Ne Malofte oni skribas en esp-o k tamen ne estas esp-o, kion oni skribas. »

* * *

DANKON AL ĈIUJ SENDANTOJ DE INTERŜANĜ-EKZEMPLEROJ. A. R.

# KORESPONDU !

Tarifo por korespondado :
Trilinia anonco kostas 2 respondkuponojn.
Ĉiu plia linio kostas 1 respondkuponon.

FRANCIO

*K-do Rousseau Louis,* Sarlande (Dordogne), Francio, dez. kor. k. ĉ. l.

USONO

*K-do Eŭgeno Klein,* buĉisto, 1565 Nostrand Avenue, *Brooklyn,* N. Y., U. S. A., dez. kor. kun diverslandaj gelaboristoj. Respondon garantias al ĉiu serioza koranto.

SOVETIO

Studento 17jara tre deziras kor. k ĉiulando, pri iu ajn temo. Ankaŭ interŝ. gazetojn, fotojn, P. I. Resp. garantiata : *Leo Gorodeckij,* Ulica Ŝaumjana n-o 91, kv. 8, *Rostov-Don.*

14-jara lernanto dez. koresp. kĉl. per pki., pm., fotoj k ilustritaj gazetoj. Adreso : Satanovskij Mara, Komsomolskaja 109, kv. I, ODESSA.

*K-do A. Sidorov,* Sredne - Smolenskaja ul. 28, VORONEĴ, dez. koresp. pri literaturo, interŝ. esp-gazetojn k librojn.

*K-do Kiperman, Griŝa,* Rozomovskaja 2/4, kv. 32, ODESSA, tre volonte koresp. kĉl. Mi estas 13-jara.

*K-do Ivan Hubko,* studento, dez. koresp. kun Hispanio k kĉl, pĉt. Adreso : ul. Novoproektna 4, ĤARKOV.

Grupo de 15-19 jaraĝaj geesperantistoj deziras korespondi individue aŭ kolektive pri diversaj temoj. Ni interŝanĝas librojn, ipk, gazetojn, fotojn. Ni *nepre* respondos al ĉiu, kiu al ni skribos. Adreso : Viktor Gruŝko, Socialistiĉeskaja n-o 169, kv. 4, *Rostov-Don.*

*K-do Stoletov A. A.* ul. Razina 32, *Voroneĵ,* 26-jara librotenisto dez. koresp. kun geknaboj ĉl.

K-dino *Schmidt T. S.*, Poĉamt, Poste restante, *Rostov-Don,* dez. koresp. k interŝanĝi gazetojn, librojn, speciale pri botanikaj, florĝardenaj, agronomiaj kaj arbkulturaj demandoj.

K-dino *Vera Okropiridze,* Sekudis str. 10 Lenrajono *Thbilisi,* junkomunistino dez. kor. esp. kun junkomunistoj de la tuta mondo. Respondo garantiata.

K-do *Rajenko T. I.*, Voroŝilovskaja 34, kv. 10, *Novorossijsk,* dez. koresp. kĉl. L. pĉt, k interŝanĝi il. gaz., fotojn. Respondo garantiata.

K-do *Banslov V. N.*, Starij Zavod, d. 30, kv. 6, *Pestovo,* (Len. obl.) dez. koresp. kĉl. Respondo garantiata.

K-do *V. Kotrovskij,* Sovetskaja, 238, ĵ. d. ŝkola n-o 48, *Miĉurinsk,* (Voroneĵ. obl.), 17-jara lernanto dez. koresp. kĉl.

K-do *Panĉenko I. K.*, Studgorodok, d. 9, kv. 26, Ostankino, *Moskvo,* inĝeniero dez. koresp. pri teknikaj temoj k interŝanĝi teknikan literaturon k revuojn en diversaj lingvoj.

# KESTO
## POR SPRITAĴOJ KAJ ANEKDOTOJ

### KAPRINO K LIMAKO

(Vera okazintaĵo)

En la germana urbo Dresden renkontiĝis kaprino k limako. Post ioma diskuto ili interkonsentis fari vetkuron al Berlino por decidi, kiu estas la pli rapida.

Forsaltis la kaprino, gaje blekante. Forrampis la limako kun pacienco propra al ĝi.

Post 110 tagoj la limako alvenis en Berlino k atendis ĉe la interkonsentita loko : Pordego Brandenburga. Sed nenie estis videbla la kaprino. Nur post 3 pluaj semajnoj ĝi alsaltis laca k aĉhumora.

« Kiel povas okazi, ke vi alvenas tiom malfrue », demandis la limako. « Sendube mi sukcesis k gajnis la veton. »

« Jes », malgaje respondis la kaprino. « Sed kiam mi trakuris la germanajn stratojn k vojojn, trapasis la vilaĝojn k urbojn mi ĉie sentis bezonon bleki (*). Kiom da observoj igis min halti k bleki (*). Mi tute ne povis ĉesi k blekadis konstante. Jen la motivo pri mia malfruiĝo. »

« Jes, ja », melankolie respondis la limako. « Sed ĉu mi ne ĉiam diris al vi : se en la « Tria Regno » oni volas sukcesi, oni ne devas bleki, oni devas rampi sur la ventro. »

(*) *bleki :* berlina dialektaĵo, populariĝinta tra tuta Germanio kun la signifo : konstati mankojn k kritiki ilin.

* * *

Instruisto diris al la lernantoj, ke bestoj kiaj krokodiloj, elefantoj k. a. havas tre longan vivon. Poste li demandis :

« Diru al mi, Jozefo, nomon de besto, kiu vivas longe. »

« La krokodilo, sinjoro. »

« Kaj vi, Johano ? »

« Musolini, sinjoro. »

« Ĉu vi freneziĝas ? Kial do ? »

« Car hejme, parolante pri la gvidanto oni ĉiam diras : ĉu tiu besto neniam mortaĉos ? »

El Aŭstralia L E A-Bulteno.

La instruisto diris al la infanoj : Mi konsilas al vi, frue iri el la lito. Estis iam viro, kiu tre frue ellitiĝis por promeni k li tiam trovis monujon.

« Nu », diris unu el la knaboj, « sed la homo kiu perdis la monujon ellitiĝis ankoraŭ pli frue ! »

*Juna Vivo.*

* * *

Ebriulo A : « Kiu estas la plej bona jako ? »
Ebriulo B : ? ? ?
Ebriulo A : « La konjako. »

MENDU TUJ!

VI VOLAS RIDI ?

Legu la amuzan libreton facilstilan :

**La aventuroj de LRM Stultulof la 10-a**

Tiu originala verko estas eldonita de la Belga IPE-sekcio por ebligi la sendon de delegitaro al la 3-a IPE Kongreso en Parizo 1937.

**Prezo ; Unu Internacia Respondkupono**

Mendu al k-do F. Van Dooren, Korte Veldstr. 69/2, Turnhout, Belgio, aldonante *unu* respondkuponon po ekzemplero.

# SP-RECENZEJO

F. V. Dorno : *La aventuroj de L. R. M. Stultulof la Xa.* Eldonis : Belga I P E-Sekcio, Antverpeno. Formato : 14 × 18. 16 pĝ. Prezo : unu internacia respondkupono. Mendebla ĉe : F. Van Dooren, Korte Veldstr. 69/2, *Turnhout,* Belgio.

La aŭtoro per spritaj ideoj ironias pri la zorgoj, la « reĝaj » zorgoj de Lia Reĝa Moŝto, mokante tiel la reĝismon ĝenerale, sed ankaŭ la subtenantojn al ĝi. Ja en la fino de la interesaj aventuroj la aŭtoro igas krii la « popolon » : « Vivu la reĝo ! »

La enhavo estas lingve korekta. Diversaj preseraroj ne multe ĝenas dum legado.

* * *

G. Dimitrov : *La laborista klaso kontraŭ la faŝismo.* Esperantigis : Kolĉinski. Eldonis : Ukrainia Eldonejo de Naci-Minoritoj. Formato : 13 x 17. 176 pĝ. Prezo nemontrita.

Certe estus malfacile trovi homon, kies paroloj efikus pli aŭtoritate ol tiuj de Georgi Dimitrov, kiam temas pri analizo je la ofensivo de l' faŝismo.

Tre gravaj estas la paroloj de Dimitrov pri la unueca fronto. « Kion povas kontraŭdiri k kion kontraŭdiras la kontraŭuloj de la unueca fronto ? » li demandas. « ...la lozungo pri unueca fronto estas nur manovro — diras iuj. Sed se ĉi tio estus manovro — respondas ni — kial do vi ne senvualigu la « komunistan manovron » per via honesta partopreno en la unueca fronto ? » Jen *unu* respondo al la diversaj elturnaĵoj de la kontraŭuloj al unueca fronto. Kiom trafe tiujn respondajn vortojn ni povas apliki ankaŭ en la laborista esp-movado !

La libro enhavas certe pli ol nudan raporton. El ĉiuj linioj spiras la racia logiko amikiĝinta kun profunda sento k pasio.

Kiu volas ĝui la parolojn de pasia antifaŝisto, kies logikaj rezonoj centprocente absorbas la leganton tiu *nepre* aĉetu la libron. Ni varme rekomendas ĝin. Plej multajn neologismojn uzatajn de l' tradukinto ni opinias dume superfluaj. A. R.

* * *

E. van Veenendaal-Bouwes : *La Juna Vivo,* internacia esp-lernolibreto. Eldonis : « La Juna Vivo », West-Graftdijk (N. H.), Nederlando. Formato : 16,5 x 22. 32 pĝ. Prezo : fr. fr. 2.00, dol. 0.15, sv. fr. 0.40, gld. 0.20, sv. kr. 0.50 k 15 % sendkosto.

La metodo aplikata en tiu ĉi lernlibro estas bazita sur « la moderna pedagogia principo : Lernado per imitado ». La verkintoj ĉefe konsideris la lingvouzadon por la vivo ĉiutaga. « Ĉenkantoj » kun notoj, same kiel la multnombraj ilustroj serene gajas tra la libro. Lernolibro, kiun profitas certe la « Juna Vivo » esp-ista, eĉ se temus pri kvindekjaruloj ! Oto Flok.

## ALVOKO AL PROLETIDOJ

Dum kelkaj monatoj heroa hispana popolo kuraĝe batalas kontraŭ faŝistaj ribeluloj.

Miloj da hispanaj infanoj ekestis pro tio orfoj. Ili bezonas ne nur moralan helpon, sed ankaŭ ili bezonas materialan helpon, ili bezonas nutraĵojn, vestojn k. s.

Ni junaj sovetiaj esp-istoj el urbo *Rostov-Don* kunvenis k kolektis inter ni pli ol 80 fr. fr. (t. e. ke ĉiu el ni oferis po proksimume 8 fr. fr.). La monon ni jam sendis por helpado al hispanaj infanoj.

Ni alvokas ĉiujn geknabojn ĉiujn gejunulojn kiuj arde deziras, ke milito k faŝismo pereu, ke ili sekvu nian ekzemplon k *senprokraste* oferu, laŭ sia ebleco al hispanaj infanoj, kiuj treege suferas pro faŝista ribelo en Hispanio !

Sekvu imitindan ekzemplon de sovetiaj gelaboristoj ! !

Per via monereto vi helpos ne nur al hispana infanaro, sed ankaŭ vi helpos al neniigo de la faŝismo ! !

Montru vian proletan k internacian solidarecon ! !

L. Gorodeckij ; J. Ŝulman ; A. Visokodrogov ; A. Nosov ; G. Rosin ; L. Aĥverdov ; K. Osikina ; J. Varjuĥin ; P. Berdiĉevskaja ; M. Sluckaja.

Rostov-Dona P E K-Filio. — Adreso : Inĝ. V. Gruŝko, Socialistiĉeskaja 169, kv. 4, *Rostov-Don* U. S. S. R. (Sovet-Unio).

G. DIMITROV

**La laborista klaso kontrau la fashismo**

Prezo : Fr. Fr. 7.00

Ĉu S A T-ano, ĉu I S E-ano, ĉu I P E-ano : ĉiu proleta esp-isto legu la pasiajn parolojn de la fama antifaŝisto. Modela esp-traduko ! 176 paĝoj da interesega legaĵo !

Mendu ĉe :

*Ekrelo,* Bourse du Travail, 14 rue Pavée - *Nîmes,* (Francio).

*Le Gérant* : G. Salan.

Imp. Coop. LA LABORIEUSE, rue J.-B.-A. Godin, 7, Nîmes